

N-ro 151 Vintro 2009

# ISRAELA ESPERANTISTO

ISSN 1565-3315

Organo de Esperanto-Ligo en Israelo  
האספרנטיסט הישראלי - ביטאון האגודה לאספרנטו בישראל

**Leteroj de Zamenhof**

**Jubilea KIES en Pacoazo**

**Memore al Jelena Klauber**



KIES-ekskurso al la Morta Maro, oktobro 2009

# Rememoroj de israela Esperanto-veterano


Josef Šemer

## Dua parto: 1967

MI VIZITADIS la klubon ĉiudimanĉe, ĝis la tago de mia soldatiĝo (nov. 1968), iom post la aĝo 18. Post la trijara arma servo mi revenis al mia “verda familio”, sed tiam la klubo jam situis en alia loko: en subtera loĝejo ĉe str. Rembrandt 18, Tel-Avivo. La forlaso de la lokalo en Káliŝer-strato okazis dum 1968.

La tiamaj veteranoj rakontis al mi ke dum la 50-aj jaroj la esperantista agado en Tel-Avivo estis malmulta kompare al tiu de la 40-aj jaroj. Tamen okazis tie regulaj semajnaj kunvenetoj, en privataj hejmoj. Nur en 1959, la jubilea jaro de Esperanto (1859–1959), denove revigliĝis la agado: fondiĝis la “Kaliŝera” klubo kaj ekaperis la revuo NIA LIGILO. Tamen ĝis la jaro 1966, kiam d-ro Maŝler komencis la serion de la kursoj, ne venis al la movado multaj novuloj. Post mia kurso li daŭrigis la instruadon kaj gvidis dum kelkaj jaroj du kursojn ĉiujare, en la sama domo. La urbestro de Tel-Avivo disponigis al ni senpage la klasĉambbron kaj ankaŭ helpis al ni finance pri la strataj afiŝoj (estis foje aliaj tempoj...).

D-ro Maŝler estis en tiuj jaroj, kaj ankaŭ dum la 70-aj jaroj, la motoro de la movado. Li multege prelegis pri Esperanto en diversaj lokoj, inkluzive de mezlernejoj. Li informadis pri Esperanto en la amaskomunikiloj kaj dank’ al lia varba kaj instrua agado la nombro de la israelaj esperantistoj kreskis signife. Novaj fortoj aperis, inkluzive de junuloj. Sed sendube la plej elstaraj kaj memorindaj okazaĵoj (aŭ “neokazaĵoj”) ... de la



sesdekaj jaroj estis la planitaj Universala Kongreso de Esperanto (UK) kaj Internacia Junulara Kongreso (IJK).

Sekve de invito far ELI, decidis UEA kaj TEJO okazigi en julio 1967 siajn kongresojn en Israelo. La UK devis okazi en Tel-Avivo kaj la IJK en Netanjá. Fondiĝis Lokaj Kongresaj Komitatoj (LKK) por ambaŭ eventoj. Josef Kohen-Cedek el Jerusalemo fariĝis prezidanto de la LKK. Sed ĝia 'motoro' estis sendube la vicprezidanto de la LKK kaj prezidanto de ELI, Isaj Dratwer el Bat-Jam, eminenta kaj mondkonata Esperantisto (interalie la ĉefaktivulo de la pola E-movado ĝis lia alveno al Israelo kaj proksima amiko de Ivo Lapenna).



Komenciĝis la laboro. Mi mem ne partoprenis ĝin estante tre juna novulo, sed atingis min eĥoj pri diversaj kvereloj okazintaj inter la LKK-anoj. Kelkaj membroj rakontis ke I. Dratwer estis tro severa kaj 'diktatoreca'. Iu rakontis al mi interesan kuriozaĵon pri tio, kio okazis dum unu el la kunsidoj de la LKK: kiam ekflamiĝis tiam la kriado, la italo s-ro G. Pompilio – tiama Konstanta Kongresa Sekretario de UEA, kiu ĉeestis parton de la kunsidoj – subite laŭtkriis: *MASPIKAS!* (maspík, hebree: sufiĉe)

Kiel kongresejo estis elektita Domo Bnej-Brit en Tel-Avivo, situanta en str. Káplan. Oni planis solenan inaŭguron en Jerusalemo, belajn ekskursojn

ktp. Kun granda ĝojo oni akceptis la konsenton de la prezidento Zálman Ŝazár fariĝi prezidanto de la Honora Komitato, kun lia promeso “eble ĉeesti la Inaŭguron”. Granda entuziasmo regis tiam inter la israelaj esperantistoj.

Sed kiam en la mezo de majo 1967 ekis la streĉiteco inter Egiptujo kaj Israelo kaj ombroj de proksimiĝanta milito kovris la ĉielon, UEA decidis jam je la 31-a de majo (!) translokigi la UK-on de Tel-Avivo al Roterdamo. Mi memoras ke niaj aktivuloj estis tre koleraĵoj pro la “tro hasta” decido kaj protestis kontraŭ ĝi, sed nenio helpis. Ni devis do atendi ĝis la jaro 2000 por efektiviĝi nian revon pri UK en Tel-Avivo.

Eble interesas vin scii, ke 119 (!) israelanoj aliĝis al la tel-aviva UK (en 2000 aliĝis nur 70 el Israelo), ke la oficiala kongresa vojaĝagentejo estis Peltours, ke la tuttaga ekskurso al Jerusalemo ne inkludis viziton de la Muro de Ploreĝo, ke la kongresa bankedo devis okazi en kafejo Dolfín (kiu konas ĝin?) kaj ke mia kongresa numero estis 657...

La Estraro de UEA, estante konscia pri la koleriĝo de la israelaj samideanoj, honorigis nin titolante la roterdaman UK-on jene: “52-a UK de Esperanto (Tel-Avivo) Rotterdam” (jes, ili ial skribis Rotterdam, ne Roterdamo...). Sur la kovrilpaĝo de la Kongresa Libro aperas ankaŭ nigrablanka foto de Tel-Avivo (la plaĝo), fotoj de la israela prezidento kaj la urbestro de Tel-Avivo (M. Namir), kaj nomoj kaj adresoj de ĉiuj 119 aliĝintaj israelanoj.

Post la nuligo de la UK I. Dratwer kaj lia edzino deflankiĝis de la israela movado kaj ne plu partoprenis la kunvenojn. Temis pri ofendiĝo aŭ io simila... Sed menciindas, ke malgraŭ tio ili post multaj jaroj decidis heredigi sian loĝejon al ELI. Tio okazis tre verŝajne dank’ al konvinkado far Raĥel, la edzino de nia aktivulo Josef Murĵan.

Kiu organizis samtempe la Junularan Kongreson kaj kio estis ĝia sorto? Pri tio mi rakontos en la venonta gazetnumero.



(daŭrigota)

## “La Reestiĝo de Nacio”


Jean Amoureux, Francio

“La Ekzekutivo de la Cionista Organizo prezentas ĉi-tiun libreton al la 24-a Universala Kongreso de Esperanto kiel modestan signon de sia simpatio kun la movado alcelanta pacon kaj interpopolan interkomprenon. La unua kondiĉo de interkompreno estas tamen la reciproka sinkono de la nacioj de l'mondo. Tiu-ĉi libreto helpu al la interesuloj ekkoni, se eĉ malmulte, la plej gravan fenomenon de la nuntempa vivo de la Hebrea nacio. Pluajn informojn la Cionista Organizo volonte donos al korespondantoj. Cetere, la plej bonajn informojn oni povas ricevi en Palestino mem. Se iam la Esperantistaro decidus kongresi en nia Hejmlando, ĝi estos plej sincere kaj plej kore bonvenita!” –

Antaŭparolo al “La Reestiĝo de Nacio”, Londono (1932), 24-paĝa, multilustrita.

Tiam loĝanta en Londono kaj partoprenanta en la 24-a Universala Kongreso de Esperanto en Parizo (1932), estas evidente ke Imanuel Olsvanger ne estas fremda al tiu ĉi eldono. Mia demando al la legantoj estas: *ĉu iu povus informi pri la dumkongresa kunveno por prezenti kaj disdoni la koncernan broŝuron?*

De mia flanko jen kelkaj sciigoj. La ĉialdonita foto montras I. Olsvanger (dekstre) parolanta kun kongresanoj. Apud li – kun barbetoj kaj ĉapelo ĉekape – estas Georges Avril, estro de la Gazetara Komisiono de la Internacia Centra Komitato (ICK). Dum tiu kongreso la prezidanto de la Komisiono



por la Eksterlanda Gazetaro estis Salo Grenkamp-Kornfeld. Kiam en 1934 G. Avril fondis – kaj estis direktoro de – la sedependa kaj multvalora “Nia Gazeto”, Grenkamp iĝis ĝia ĉefredaktoro kaj en tiu heroldo de zamenhofa esperantismo Izrael Lejzerowicz [LEJZEROWIĈ], prezidanto de “Hebrea Esperanto-Asocio”, havis tribunon. Cetere pri historio de hebrea Esperanto-movado mi resendas al du artikoloj de Ulrich Lins: “Krio de homo korvundita” – revuo Esperanto de aprilo 2001 plus “Ilustrita mispaŝo” en n-ro de oktobro 2001; “Judoj kaj la Esperanto-movado” – La Gazeto, n-ro 126, oktobro 2006.

(reagojn bv. sendi al Jean Amoureux, Rue de Sorede, FR-66100 Perpignan)





# Jubilea KIES en Neve-Ŝalom (Pac-oazo)

Amri Wandel

FINE DE oktobro okazis la 10-a *Komuna Israela Esperantista Semajnfino*, kiu ekde 2001 estas la plej granda regula Esperanto-renkontiĝo de Israelo (kiel Renato Corsetti prave asertis, tio estas efektive la israela E-Kongreso). En la lastaj jaroj ĝi fariĝis ankaŭ internacia. Ĉi jare, el ĉ. 60 partoprenantoj, 11 venis el eksterlando: Rusio (7), Italio (2), Germanio (1) kaj Japanio (1). Sekve tiu-ĉi jubilea KIES estis la plej granda kaj plej internacia ĝis nun. Ĉi-foje, estis ĝi tritaga intensa kunveno en la vilaĝo Pac-oazo (*Neve Ŝalóm/ Ŭahat a'-Salám*) apud Jerusalemo, kie harmonie kunloĝas judoj kaj araboj.

Samloke okazis en la jaro 2000 seminario antaŭ la UK de Tel-Avivo. La situo estis perfekte taŭga por la KIES-ĉeftemo: "Paco kaj kunekzisto". Kadre de la ĉeftemo la partoprenantoj aŭdis de loka araba loĝanto pri la vivo de judaj kaj arabaj familioj en tiu unika vilaĝo (kiu eĉ havas retpaĝon en Esperanto). Renato Corsetti gvidis provokan diskuton pri la Mezorianta konflikto "Demandoj al israelanoj pri paco kaj la araboj", kio instigis viglan partoprenon. Alia speciala kaj populara programo estis "Invito al GO-ludo" kiun gvidis Gian Piero Savio helpe de komputila ekrano. Okazis multaj pliaj prelegoj, kiel "La kibuco en la nova epoko" de Cvi Ŝolt aŭ "400 jaroj de la teleskopo" de Amri Wandel,

komuna kantado kaj dancado kaj pluraj ekskursoj al la belaj naturo, monaĥejoj kaj historiaj lokoj en la ĉirkaŭaj regionoj. Oni eĉ produktis specialajn T-ĉemizojn por la KIES. En la tradicia resuma forumo, multaj el la partoprenantoj opiniis ke ĝi estis la plej sukcesa KIES



ĝis nun, pro la etoso, la riĉa programo kaj la variaj ekskursoj. Fotoj videblas en la retalbumo <http://picasaweb.google.com/Amri.nivut/10aKIES>.

Kiel ĉiujare, la Semajnofinon kunorganizis Nava Cinori kaj Amri

Wandel. Raportoj pri la KIES (R. Corsetti) kaj post-KIES (A. Wandel) aperis en la *Ondo de Esperanto* kaj en *Revuo Esperanto*.

Por la eksterlandaj partoprenantoj estis organizita ekskursiva programo al la ĉefaj vidindaĵoj en Israelo: dum la tuta semajno israelaj samideanoj akompanis kaj gvidis la gastojn al Jerusalemo, la Morta Maro kaj Masado kaj al la nordo – Ĥajfo (Bahaaj ĝardenoj), Nazareto (Preĝejo de Anunĉiaco) kaj Akko. La turisma programo komenciĝis jam du tagojn antaŭ la KIES: oni vizitis Jerusalemon – la malnovan urbon kaj ankaŭ la novan, kie i.a. ni haltis ĉe la strato Zamenhof kaj la Zamenhof-domo.

Dek eksterlandanoj (el Rusio, Italio kaj Japanio) kaj tri israelanoj ekveturis post la KIES de Pacoazo al la Morta Maro. La ĉiĉerona blazono estis granda verda stelo. Post kamel-rajdado apud la punkto “alteco nul” ni descendis pliajn 400 metrojn sub la marnivelo, por vizito de vera oazo – Ejn Gedi, en la Judea dezerto. Sekvis banado en la Morta Maro, kiu estas ne nur la plej malalta loko en la mondo, sed ankaŭ la plej sala, tial ĝia akvo estas tiom densa ke eblas legi gazeton flosante. Ni kompreneble legis la *Revuon Esperanto*!



Legu-horo flosante en Morta Maro

Plej impona estis la vizito de Masado. Kelkajn tagojn pli frue la eksterlanda grupo vidis en muzeo en Jerusalemo la rulaĵojn de la Morta Maro (Kumran), kiuj estis skribitaj samloke kaj samepoke kiel la sieĝo de Masado. Tricent hebreaj familioj dum tri jaroj kontraŭstaris tri romiajn legiojn, kaj fine sinmortigis por ne esti kaptitaj kaj sklavigitaj. Ni vizitis la Masadan palacon de Herodo kiu bele konserviĝis dum du mil jaroj, kaj spektis filman prezentadon pri drama historio de la arkeologia restraŭrado. Reveninte al Jerusalemo, Roza

La sekva KIES (kiu ŝanĝis sian nomon al “*Israela Kongreso*”) okazos la 20–22-an de majo en la nordisraela urbeto Kacrin. Por la eksterlandaj partoprenantoj, estos turisma programo antaŭ kaj post la Kongreso. Detalan raporton vd en la venonta n-ro.

(la sola judino en la grupo) insistis viziti *Jad Vašem*, kaj tiel en unu tago vidis du el plej gravaj simboloj de la juda popolo.

Dum intensa kaj ĝuplena Esperanto-semajno mi akompanis la eksterlandajn gastojn kaj mia ĵipo kvazaŭ fariĝis ilia surrada hejmo...

**S**zabadka (Subotica) apartenis al Aŭstro-Hungario kiam la ĉielbluaj Sokuletoj ekvidis la mondon. En tiu urbo naskiĝis en 1908 juda knabino. Kreskante ŝi ĉiam estis vigla, bonhumora kaj antaŭ ĉio ege saĝa kaj diligenta. En la jaro 1919 tiu regiono (Vojvodino), laŭ la Trianona packontrakto, estis aljuĝita al Reĝlando Jugoslavio ricevante la nomon Subotica. Iluŝka (hungarlingva karesnomo por Ilona) kreskis kaj ege deziris studi. Tio eblis nur en Jura fakultato kiu ekzistis en Subotica tiam. Ŝi entuziasmiĝis pro la ideo, ke ŝi fariĝu juĝistino. Brile ŝi finis la fakultaton kaj konkursis pri laboro. Laŭ la dekreto de la Ministerio ŝi estis sendita al la urbo Ĉ., en la interna Serbio. Ŝi preskaŭ flugis pro ĝojo al la unua laborposteno, plena je entuziasmo.

La unuan fojon ŝi forlasis la naskiĝurbon kaj la patrinon-vidvinon. Antaŭ la forvojaĝo ŝi bone laborigis la kudristinon, kiu preparis al ŝi kelkajn novajn robojn, nun iom pli seriozaj ol tiuj, kiujn ŝi portadis dum la studado. Ŝi estis nur 23-jara havante blondan buklan hararon kaj ĉiam rideton sur la vizaĝo. Sed... la prezidanto de la Juĝejo kun granda miro legis la dekreton, farante sulkojn sur la frunto. Fine, li deklaris ke virino en lia urbo ne povas servi kiel juĝistino, precipe ne kun hungara akĉento parolanta la serban. Ŝi, deveninta el eksa Aŭstro-Hungario kaj judino kun kosmopolitisma edukado, ne komprenis la decidon de la prezidanto, ĉar en ŝia urbo virinoj rajtis havi ĉiun ajn profesion. Tiam ŝi, kiel malŝvelinta balono kaj sen pliaj iluzioj, iris al la Ministerio petante alian laborlokon. Ili spite al tiu durkapa prezidanto de la juĝejo, insistis ke ŝi nepre estu ĝuste en tiu urbo akceptita. Do, finfine tio realiĝis, kaj ŝi kun granda atento kaj plenkora kontento komencis sian respondecan laboron.

Ĉiuj ekamis kaj estimis ŝin pro la seriozeco de ŝia laboro. Ŝi ege atentis ke estu justeco sen influo de aliaj kontraŭ ŝiaj decidoj.

Juna serba, ortodoksa juristo ekamis la belan hungarinon-judinon. Ili eĉ foje kune vojaĝis al Beogrado, kie fotis ilin surstrata fotisto, kiu tuj rivelis la foton. Ili sentis grandegan simpation unu al alia kaj tio iom post iom fariĝis vera, profunda kaj sincera amo.

Sed, ho ve, venis la dua mondmilito kaj al ŝi de la hejmo oni mesaĝis tuj reveni al ŝia naskiĝloko ĉar la patrino ne deziris esti sola en tiu milita ŝtormo,



kiam grizaj pezaj nebuloj kolektiĝis super juddevenaj homoj. La viro akompanis ŝin al la stacidomo, ne supozante ke ili neniam plu vidos unu la alian.

La antaŭsento de la patrino estis bedaŭrinde pravigita. Unue la germanoj forpelis la fratinton de Iluŝka, kiu edziniĝis nur kelkajn monatojn pli frue al vidvo kun 2 infanoj, pri kiuj ŝi zorgis kun vera patrina koro. Ŝi estis mortigita kune kun la infanoj kiuj eĉ ne estis ŝiaj. La edzo punlaboris en Germanio.

Poste venis ilia vico kaj la saman tagon al la getto estis kondukitaj la patrino kaj Iluŝka. Kontraŭ iom da oraj juveloj, kiujn Iluŝka sukcesis kaŝi en la hararon, iu gardisto akceptis de ŝi leteron skribitan al ŝia amata viro, kun morna informo ke ŝi troviĝas en getto, verŝajne transportota al koncentrejo. Vagonoj por transporto de bestoj estis plenigitaj de judoj, ciganoj, komunistoj kaj aliaj “malamikoj”. Ili estis transportitaj dum pliaj tagoj al grandega fifama nazia koncentrejo. Ili unue ne sciis kie ili troviĝas sed tiuj kiuj jam estis en la koncentrejo informis ilin: “Vi estas en Bergen Belsen.”

Tie ŝiaj blondaj haroj tuj estis fortonditaj kaj ŝi ricevis tatuitan numeron, kio signifas ke en la koncentrejo ili ne plu estis homoj sed nur numeroj.

En tiu urbo kie la viro vivis aperis kunlaborantoj kun nazioj. Li, por esti solidara kun sia amata judino, ne deziris labori por la germanaj okupantoj. Tamen, li ĉiutage aŭskultis novaĵojn, raportantajn ke en tiuj koncentrejoj ekzistas krematorioj kaj ke centoj da homoj mortadas, aŭ pafitaj aŭ per gaso sufokigitaj. Li perdis la esperon iam revidi la karan, ĉiam ridetantan vizaĝon de la amata amikino, kiun li planis edzinigi. Li dum tagoj kaj noktoj sen manĝo kaj dormo nur pensadis kion fari. Liaj fratinoj diris ke li devas forgesi ŝin, ĉar eble ŝi jam ne plu vivas. Je tiu penso enkaŭpe, ne dezirante konatiĝi kun alia virino sed resti fidela al sia amo, li iris al monaĥejo kaj fariĝis ortodoksa monaĥo.

La milito finiĝis. La koncentrejo estis liberigita kaj Iluŝka estis travivanta kune kun sia patrino la finon de la milito. Ŝi estis alta, forta virino kaj dank’ al tio ŝi laboris kaj ŝia eltenemo estis bezonata. Do, ŝin oni ne mortigis.

Kiam malfermiĝis la feraj pordegoj, la patrino kaj Iluŝka ne plu havis forton. Dum la lastaj monatoj ili apenaŭ ricevis manĝaĵojn. Se ne venus tiam la liberigantoj, ili estus malsatmortontaj post kelkaj tagoj. Ĉiuj liberigitoj estis ege malsanaj kaj maldikaj kaj tial la Ruĝa Kruco decidis veturigi ilin al Ĉeĥoslovakio, al la plej proksima loko kie oni povus esti prizorgataj. Unue ili estis kuracitaj kaj nutritaj por ke ili povu elteni la vojaĝon al la hejmo.

Tiuj ses semajnoj ŝajnis al ili pli longaj ol la antaŭaj jaroj, ĉar nun liberaj ili estis ligitaj al lito, senfortaj por vojaĝo. Finfine venis la tago kaj ĉiuj estis envagonigitaj kaj direktitaj diversflanken al siaj hejmoj.

La koroj batadis pro feliĉo pli forte ol iam ajn. Ili eĉ ne kredis ke tio eblas, ke ili saviĝis el la makzeloj de la sovaĝaj bestoj. Iluŝka ege ĝojis ĉar ŝia unua penso estis ke ŝi tuj devos serĉi la amatan viron. Sed la vivo estas kruela kaj senkompata. Dudek kilometrojn antaŭ la landlimo ŝia patrino subite mortis sidante apud ŝi en la vagono. La deĵorantaj akompanantoj rimarkis tion kaj forprenis la patrinon el la vagono, malpermesante Iluŝka eliri el ĝi. Ŝi neniam eksciis kie la patrino estis entombigita kaj neniam povis viziti ŝian tombon. Foje ŝi diris: “Tamen mi estas feliĉa ke la patrino travivis la senton de libereco kaj ke ŝi ne mortis en krematorio.” La malforta kaj suferanta koro de la patrino ne povis elteni la feliĉon kaj simple krevis.

La sinagogo en Subotica



Iluŝka, sola kun granda doloro, iris hejmen. Tiam ŝi eksciis ke la frato estas viva kaj ŝi atendis lian hejmenvenon. La urbo estis plena da sovetaĵoj vunditaj kaj handikapitaj soldatoj. Ĉiu lernejo servis kiel hospitalo. Ŝi terurigitigite rigardis kiel la unupieda handikapulo gvidas la blindigitan kamaradon kaj apude estis la tria sen manoj.

Kun tristo ŝi rigardis ilin kun doloranta koro, konsciante ke ili devis militi por ke la homoj estu liberigitaj de la faŝistoj.

Ŝi komencis serĉi la familianojn sed preskaŭ neniu revenis al ŝia urbo. Mortigitaj estis pli ol 4,000 judoj. (Monumento omaĝe al ili estis inaŭgurita 30 jarojn post la milito en Subotica en la korto de la plej bela sinagogo en Serbio.) Ŝi plifortiĝis kaj denove devis serĉi laboron. Ŝi ne plu emis loĝi en sia naskiĝurbo kie ne plu restis parencoj aŭ konatoj. Nun (1947) la Ministerio proponis al ŝi Beogradon. Ŝi akceptis kaj skribis al kelkaj homoj en la urbo Ĉ. petante informon pri la amata homo. Ĉiuj respondis ke ili nenion scias

pri li ĉar li forlasis la urbon meze de la milito.

Ŝi neniam edziniĝis nek sentis la ĝuon de patrineco sed vivis sola. Tamen dum multaj jaroj ŝi esperis ke iun tagon iu frapos la pordon kaj ke tiam ŝi malfermos la pordon al LI.

Mi konatiĝis kun ŝi en Beogrado kiam mi faris Esperanto-ekzamenon kaj ŝi estis ano de la ekzamena komisiono. Tiam ŝi tuj diris al mi: “Ho, kara, mi naskiĝis en sama urbo kiel vi.” Tiel ni amikiĝis.

Multfoje ŝi klarigis al mi kial ŝi eklernis Esperanton. La kialo ne estis la lingvoscio sed la ideo ke ĉiuj homoj sendepende de haŭtkoloro, religia aparteno kaj nacieco estas amikoj, samrajtaj, respektindaj kaj akcepteblaj. Do, mi ankaŭ kredis ke tio estas vero, ke la homoj estas kun samaj sentoj en ĉiu mondpatro. Ili ploras kiam ili estas malĝojaj kaj ridas pro la beleco de la mondo kaj feliĉo.

Mi kun ŝi havis kutimon unu-du fojojn monate iri al eksursoj kaj foje ni kune veturis al tiu urbo Ĉ. en Serbio. Tie ŝi montris al mi la juĝejon kie ŝi laboris kaj vole-ne-vole ekploris. Mi ne komprenis kial plori nur vidante la konstruaĵon. Mi demandis: “kial vi ploras?” – “Alian fojon mi respondos, nun mi ne kapablas,” ŝi respondis.

Pasis iom da monatoj kiam ŝi dum mia vizito montris al mi foton sur kiu estis ŝi juna, svelta, kun moderna ĉapelo surkape kaj kun feliĉa rideto. Apud ŝi estis same alta bela nigrahara viro.

– Tiu estas LI, diris ŝi mallaŭte.

– Mi ne konas lin, pri kiu vi parolas?

– Mi iam konis lin, sed li ne plu vivas.

Tio estis la foto el Beogrado. La unusola dokumento pri ŝia amo. Mi eksilentis vidante kiom doloriga estas por ŝi paroli pri tio.

Kiam ŝi revenis kaj eklaboris en 1946 en Beogrado, la fratinoj de LI post eble 30 jaroj eksciis ke ŝi estas viva kaj loĝas en Beogrado. Tiuj de kiuj ŝi petis informon pri ilia frato informis la fratinojn ke ŝi vivas. Kiam ili trovis ŝin kaj vizitis la unuan fojon, ili ne diris ke la frato vivas kaj ke li estas monaĥo.

La fratinoj iris kaj rakontis al la frato ke Iluŝka vivas, sed li triste kun amara kordoloro kaj larmoj diris: “Jam estas tro malfrue, mi jam alkuti-miĝis al monaĥa vivo kaj mi certe ne plu povos feliĉigi ŝin. Estu pli sobre ke

ŝi ne eksciis pri mi. Mi alportis mian amon al la monaĥejo kaj ĝi restu inter la monaĥejaj muroj. La superulo ne decidis ke ni estu kune. Do, mi nenion nun povas ŝanĝi. Dio benu ŝin kaj ŝi vivu longe kaj sane. Mi deziras havi pri ŝi rememoron tian, kiam ni estis junaj, kaj tiun bildon ŝian mi ne deziras forigi el mia koro.”

Post denove multaj monatoj mi vizitis ŝin kaj mi trovis en ŝia hejmo du virinojn en funebraj nigraj vestaĵoj. Unue ŝi klarigis ke la virinoj estas fratinoj de LI kaj ke li mortis antaŭ nelonge. Post ilia foriro ŝi ploregis, ploregis, veante kaj kun profunda tristo. Tiam plena je ĉagreno ŝi komencis rakonti, parolis, parolis forverŝante ĉiun doloron el si kaj tiam mi eksciis ŝian tutan vivhistorion pri kio ŝi silentis dum pli ol 50 jaroj. Ŝi malkovris la amon, kiun ŝi portis en la koro dum sia tuta vivo, kaj kio ne povis estis realigita.

Antaŭ ŝia reveno al sia naskiĝurbo, en 1993, ŝi diris: “Mi havas unu peton: bonvolu ne kremacii min. Pli ol 2 milionoj da judoj estis bruligitaj, eble mi meritas esti entombigita en la teron.” La juda tombejo estas bela en Subotica kaj estas tie loko, ĉar oni ne havas kiun entombigi tie. Eble nur 1,200 judoj restis vivantaj en Serbio. Post kelkaj monatoj en la jaro 1993, 85-jara, ŝi fermis la bluajn okulojn por ĉiam.

Ni esperantistoj akompanis ŝian ĉerkon ĝis la juda tombejo en Subotica kaj enterigis ŝin laŭ ŝia lasta deziro.

## Impresoj de la ceremonio ĉe Jad Vaŝem

**Jehonatan Kis-Lev**

En la memortago por la Holokaŭsto, la 12-an de aprilo 2010 (*Kaf-Ĥet* de *Nisan* laŭ la hebrea kalendaro), Esperanto-Ligo en Israelo kaj Universala Esperanto-Asocio honoris kune la memoron de la viktimoj de la Holokaŭsto, en la oficiala ŝtata ceremonio en Jad Vaŝem, Jerusalemo. Mi havis la honoron partopreni ĝin kun Malka (‘Reĝino’) Zemeli kaj meti flor-bukedon nome la Esperantistoj.

Mi jam aŭdis pri la libro de Ulrich Lins *La Danĝera Lingvo*. Kiam mi estis en Herzberg (la Esperanto-urbo) en Germanio, E-instruisto s-ro Otto Kern rakontis pri ĝi kaj klarigis al mi la rilaton inter la Internacia Lingvo

kaj la Naziismo. Mi sentis tiam, ke esti e-isto havas pli grandajn implikojn ol mi unue pensis. Mi sentis fiera pro mia esperantisteco. Mi sentis kiel parto de grandega movado por internacia paco.

Kiam Malka kaj mi paŝis al la centro de la korto, aŭdinte en la laŭtparolilo la nomojn de ELI kaj UEA, mi sentis kvazaŭ paŝas kun ni homoj el la tuta mondo, de la nuntempo kaj de la pasintaj tempoj. Ni kune surmetis la flor-bukedon inter la aliaj buketoj prezentitaj de diversaj judaj komunumoj, organizaĵoj, asocioj kaj landoj de la tuta mondo. Por unu momento, kiu daŭris kiel horoj, ni staris silente kaj reprezentis la esperon por la homaro. La espero de Esperanto. Ni memoras kaj memoros ĉiujn, kiuj estis viktimoj de aliaj homoj, kiuj forgesis la senton de la homaro. La senton de kuneco, kiun Esperanto bonege simbolas.

M. Zemeli kaj J. Kis-Lev



## Letero de Zamenhof (al HEA) en la Nacia Biblioteko, Jerusalemo

Josef Ŝemer

EN 1914 fondiĝis en Eŭropo asocio de judaj e-istoj: *Hebrea Esperanto-Asocio* (HEA). Ĝi nomiĝis ankaŭ *Tutmonda Esperantista Hebrea Asocio* (TEHA). La iniciatintoj estis Iĉhak Muĉnik (kiu poste elmigris Palestinon), Izrael Lejzerowicz [LEJZEROVIĈ] (tre fama esp. verkisto), d-ro Walter Lippmann, Leopold Dreher (por israelanoj pli bone konata sub sia pseŭdonimo *Leo Turno*, kies polan lernolibron tradukis en 1965 d-ro H. Maschler [MAŜLER]) kaj aliaj. Kiel sekretario funkciis Wilhelm Heller el Moravio (nuntempa Ĉeĥio). La fonda kunveno en Parizo ne okazis pro la komenciĝinta mondmilito. Bedaŭrinde mankas informoj pri la projekto. Ulrich Lins, esploristo pri la historio de Esperanto, skribas en *Israela Esperantisto* n-ro 141 (decembro 2004): “Ni scias pri tiu asocio ne multe pli, ol ke oni klopodis krei ĝin.” Sed ĉi tie mi deziras pritrakti nur la leter-interŝanĝon inter Zamenhof kaj la sekretario Wilhelm Heller.

La iniciatintoj de la nova asocio invitis d-ron Zamenhof al ĝia fonda



kunveno. En sia respondletero, sendita al Heller la 1914-06-30, Zamenhof esprimis korajn bondezirojn, sed klarigis, ke li ne povos aliĝi kiel membro. Kiel homarano li preferas stari ekster iu nacia organizo. Tiel skribas Zamenhof: “La ideon fondi Hebrean Esperanto-Asocion mi plene aprobas. Jam antaŭ longe oni devis tion fari... Mi estas profunde konvinkita, ke ĉiu nacionalismo prezentas por la homaro nur plej grandan malfeliĉon, kaj ke la celado de ĉiuj homoj devus esti: krei harmonian homaron... Tio estas la kaŭzo, pro kiu mi, malgraŭ la korŝiraj suferoj de mia gento, ne volas ligi min kun hebrea nacionalismo, sed mi volas labori nur por interhoma justeco absoluta.”

Verŝajne la unua, kiu informis nin pri tiu ĉi letero, estis Edmond Privat. En sia fama libro *Vivo de Zamenhof* (1920) li aperigis fragmenton de tiu letero. Tiu ĉi fragmento estis poste publikigita en pliaj libroj. Sed oni ne sciis, ke temas nur pri parto de letero, ĝis kiam Jeremi Giŝron el Israelo trovis en 1982 la tutan tekston ĉe la Nacia Biblioteko en Jerusalemo. Jeremi trovis tie ankaŭ alian leteron, kiu estis sendita de Zamenhof al Heller 10 tagojn post la unua, la 1914-07-09. En ĝia komenco skribas Zamenhof: “Respondante al via letero de 4/7...” Temas do pri la dua letero sendita al la sekretario de HEA. En la sama arkivo Jeremi trovis ankaŭ poŝtkarton, kiun Zamenhof sendis al Heller la 10-an de julio, klarigante iun terminon uzitan en la dua letero. Jeremi sendis la fotokopiojn de la du leteroj kaj de la poŝtkarto al Ludovikito (ITO Kanzi [kanĵi] el Japanio), kiu aperigis ilin en sia ampleksa *Plena Verkaro de Zamenhof*.

Sed Ludovikito aperigis nur la kopiitan tekston de la leteroj kaj ne la originalajn leterojn maŝinskribitajn de Zamenhof. La originaloj de la leteroj, inkluzive la subskribojn de Zamenhof, ne aperis ĉe li. Kiam mi lastatempe eksciis pri tio, mi ekmemoris, ke antaŭ kelkaj jaroj nia aktiva membrino Malka (‘Reĝino’) Zemeli vizitis la kolekton de aŭtografoj *Shvadron* en la Nacia Biblioteko kaj fotokopiis la du koncernajn leterojn. Ŝi bonvolis tiam doni al mi ambaŭ fotokopiojn – “je la servo de la historio”. Mi do turnis min antaŭ kelkaj monatoj al mia esperantista amiko Aleksander Korĵenkov, kiu estas verkisto, redaktoro kaj zamenhofologo. Ni interkonsentis pri tio, ke li faksimile aperigu en la *La Ondo de Esperanto*, kiun li redaktas, la unuan leteron de Zamenhof al Heller, dum mi publikigos la duan leteron en *Israela Esperantisto*. La israela-rusa projekto bone ekfunkciis, kiam en decembro 2008 aperis la unua letero en *La Ondo de Esperanto*. Nun aperas ankaŭ la dua, en la israela revuo.

Bonvolu memori, ke temas pri pionira publikigo, ĉar ĝis nun la originalo neniam aperis. Ni do povas vidi sur la letero unufoje la korektojn maŝin-skribe faritajn de Zamenhof, kelkajn subliniojn kiujn li desegnis mane, lian stampon ĉekape kaj lian subskribon ĉe la fino!

**DRO L. ZAMENHOF**

VARSOVIO

str. Dzikka N<sup>o</sup> 9.

9. VII. 1914.

Kara Sinjoro!

Respondante al Via letero de 4/VII, mi povas diri al Vi, ke mi tute ne ~~ekzistas~~ insistas pri Cionista (aŭ eĉ pri nacieca) karaktero kaj nomo de la Asocio; mi volis nur atentigi Vin pri tio, ke estas necese aranĝi la aferon en tia maniero, ke la ne-nacionalaj hebreoj (precipe el la Okcidenta Eŭropo) ne havu kaŭzon por protesti se oni faros en ilia nomo ion, kio estas kontraŭ iliaj konvinkoj.

Elekti "nacion delegiton" por la kongreso ŝajnas al mi ne konsilinde, ĉar tio ĉi certe elvokus proteston aŭ eble eĉ skandalon de la flanko de tiuj hebreoj, kiuj rigardas la hebrescan nur kiel religion. Se Vi volas elekti "delegiton de hebreoj", Vi devas tion fari en formo tre singarda, por doni al neniu kaŭzon por protesto.

Oni povus ekzemple elekti delegiton de la "konfesantoj de la hebrea religio"; sed tion ~~ekzistas~~ <sup>verŝajne</sup> la kongresestraro ne povas permesi, ĉar neniu religio ja elektas siajn delegitojn.

En tiaj kongresoj oni elektas delegitojn nur de lando aŭ de lingvo; sed ĉar la hebreoj prezentas nek landon nek lingvon, tial - eĉ se la Organiza Komitato konsistos el la plej grandaj amikoj de hebreoj - elekti senskandale delegiton de la "hebrea popolo" estas afero tre malfacila.

Tion mi siatempe klarigis al la hebreoj-esperantistoj en Krakovo, kiam ili plendis al mi, ke la Organiza Komitato ne permesas al ili elekti delegiton de la "hebrea popolo"; mi ~~ĉi~~ klarigis al ili, ke oni povus elekti facile delegiton de "Palestino", de la "hebrea religio", de la "jidiŝ-lingva popolo" aŭ de la "spaniol-lingva popolo" ĉar tia lando, religio, kaj tiaj popoloj fakte kaj sendube ekzistas; sed se oni volus elekti "nacion" delegiton de la "popolo


~~hebrea~~

hebrea" (t.e. pan-hebrea), kiu ja en efektiveco konsistas de diversaj, inter si malsimilaj etnologiaj grupoj, tio povus kaŭzi akran proteston, tiel same, kiel se oni elektus delegiton de la "popolo panslava" aŭ "popolo panromana" aŭ "popolo panprotestanta" aŭ "panmahometana". Sed malgraŭ tio, ke mi tute ne volas min miksi en la aferon, ke mi tute ne malhelpis la Krakovajn hebreajn esperantistojn intertrakti kun la Organiza Komitato, sed mi nur esprimis al ili mian personan opinion, - tuj post la Krakova kongreso en multaj Amerikaj jidiŝaj gazetoj aperis korespondoj, kiuj akre atakis min kaj ĉiujn esperantistojn, akuzis min, ke mi protestis kontraŭ elekto de hebrea delegito, ke mi hontas pri mia hebreeco, ke mi volas kaŭzi mian hebreecon k.t.p.!!

Tial mi nun tute ne volas min miksi en la aferon. Ĉu oni devas elekti delegiton de la "hebrea nacio" aŭ ne - tion decidi la hebreaj esperantistoj en sia antaŭkongresa kunveno en Parizo. En la okazo, se la Organiza Komitato demandus mian opinion (mi tre dubas, ĉu oni min demandos), mi diras nenion "por" kaj nenion "kontraŭ".

Se Vi volos paroli kun mi en Parizo, mi kun plezuro estos ĉiam al Via dispono. Mi loĝos en Hôtel Windsor, 26 rue de St.Petersbourg.

Via



## 2009: la Internacia Jaro de Astronomio


**Amri Wandel**

La Internacia Jaro de Astronomio ([www.astronomy2009.org](http://www.astronomy2009.org)), akronime IJA2009, estas tutmonda projekto iniciatita de la Internacia Astronomia Unio (IAU) kaj UNESCO por helpi al ĉiuj homoj remalkovri sian lokon en la universo per simpla alrigardo kaj observo de la nokta ĉielo, tiel atingante personan admiron de la universo, spertadon kaj komprenon de la mirindaj atingoj de moderna astronomio dum la lastaj jarcentoj, ĝia giganta kontribuo

al nia kompreno de la Universo kaj ĝia profunda influo al la scienco kaj la ĉiutaga vivo.

IAU lanĉis IJA2009-n dum ĝia ĝenerala asembleo en Aŭstralio, 2003, sub la temo 'Malkovru la Universon'. En 2005 aliĝis UNESCO, kaj la 20-an de decembro 2007 UN proklamis la jaron 2009 Internacia Jaro de Astronomio. La intenco estas krei internacian manifestacion de astronomio kaj ĝiaj kontribuoj al la socio kaj kulturo, kun emfazo de eduko, publika enmiksiĝo kaj partopreno de gejunuloj. Junulojn kaj personojn ĉiuaĝajn certe allogos la oficiala video-filmeto de IJA2009: <http://www.youtube.com/watch?v=WVJmZmo6kzI>

Astronomio estas unu el la plej antikvaj fundamentaj sciencoj. Ĝi profunde influas nian kulturon kaj estas potenca esprimo de la homa intelekto.



En la lastaj jardekoj astronomia esploro faris gigantan progreson. Antaŭ cent jaroj ni apenaŭ konsciis pri la ekzisto de la Lakta Vojo, nia hejma galaksio. Hodiaŭ ni scias ke la Universo konsistas el miliardoj da galaksioj, kaj ke ĝia aĝo estas 13.7 miliardoj da jaroj. Antaŭ dudek jaroj ni ne sciis, ĉu ekzistas planedaj sistemoj similaj al nia Sun-sistemo. Hodiaŭ ni konas pli ol ducent planedojn ĉirkaŭ aliaj steloj en nia parto de la Lakta Vojo. Antaŭ cent jaroj ni observis la ĉielon nur per lumo videbla je niaj okuloj. La nunaj teleskopoj ne estas limigitaj al la videbla lumo, sed esploras la universon en pluraj specoj da radiado, kiuj ne estas percepteblaj per homa okulo, kiel radio-ondoj, infra-ruĝaj kaj rentgenaj radioj.

2009 estas ankaŭ la 400-a datreveno de la inventaĵo far' Galileo Galilej, kiu ŝanĝis nian komprenon de la universo: la astronomia teleskopo. La simplan tubon de Galileo nuntempe anstataŭas gigantaj teleskopoj en la spaco kaj ĉe la pintoj de altaj montoj. Per ili ni povas esplori galaksiojn preskaŭ ĉe la horizonto de nia universo, je distanco (tempa kaj spaca) de miliardoj da lumjaroj. La okulojn kaj desegnaĵojn de Galileo anstataŭas komplikaj elektronikaj kaj optikaj aparatoj, kiel CCD kaj la spektrometro. Galileo utiligis sian inventaĵon por malkovri interesajn astrono-

miajn objektojn kaj fenomenojn, kiel makulojn sur la Suno, la lunojn de Jupitero kaj la fazojn de Venuso. La ĉi-lasta malkovro ankaŭ konfirmis la heliocentran teorion de lia pola samepokano Koperniko.

Dum la jaro 2009 oni planis astronomiajn aranĝojn je niveloj nacia, regiona kaj tutmonda. En 141 landoj funkcias naciaj ligejoj, kiuj helpas krei kunlaboron inter amatoraj kaj profesiaj astronomoj, sciencaj centroj kaj publikaj komunumoj. La naciaj ligejoj listiĝas ĉe la IJA2009-retejo. Fine de julio aldoniĝis al tiu listo unu plia lando: Esperantujo. Temas pri IKU (Internacia Kongresa Universitato) dum la UK en Bjalistoko. Unu el la prelegoj de la AIS-IKU-kurso pri la temo “Teleskopoj” estis dediĉita al la IJA2009.

## **Internacia Festivalo en Nördlingen** **Esti Saban**

ĈIO KOMENCIĜIS pro unu demando: “Ĉu vi volas partopreni la IF-on (*Internacian Festivalon*) ĉi-jare?” Certe mi volas. Sed ĉu mi povas, tio estas alia demando. “Kial ne?” mi respondis, sed bileton mi ankoraŭ ne aĉetis...

Antaŭe mi ne konis Hans Dieter Platz (la eterna IF-organizanto), kiu sendis al mi mallongan mesaĝon: “Kara Esti, dankon pro via respondo. Mi notis vin inter la aliĝintoj kaj ŝatus indiki vian adreson en la broŝuro, se vi konsentas. Ĉiukaze en la 1-a de januaro (vespere, 20.00 h, ±90 min.) vi kaj Amri devas esti en la festivalo pro via komuna Israela Vespero... Ĝis! Kore, HDP”



Finfine mi trovis malmultekostan flugbileton, preparis valizon kaj ek al la flughaveno! Mi forlasis la sunan Tel-Avivon kaj post kvin horoj atingis la malvarman Munkenon. Post la aviadilo venis buso kaj trajno (mankis nur ŝipo...). Dum la longa vojaĝo mi sentis min iom sola, sed ne por multe da tempo. Mi antaŭĝojis revidi malnovajn geamikojn kaj trovi novajn samideanojn.

Lasta haltejo: Nördlingen. Subite mi aŭdas nian lingvon kaj kune kun du geamikoj mi piediras al IF-ejo. Kvankam ni alvenis antaŭ la oficiala komenco, HDP akceptis nin tre afable, kune ni vespermanĝis kaj poste helpis



iom prepari materialojn por la alvenontaj partoprenantoj.

Nördlingen – mezepoka urbeto kun tre impona komplete konservita urbo-muro – malfermis la pordegon kaj tre plaĉis al mi. Ĝi estas malgranda urbo sed ne mankas vidindaĵoj. En la tre komforta gastejo ni trovis belajn purajn ĉambrojn, bongustajn manĝaĵojn en tre larĝa manĝejo kaj eĉ saŭnon.

Estis riĉa programo kun kursoj, prelegoj, dancado kaj muziko.

La temo – “Fabeloj, fabloj kaj legendoj” – inkluzivis rusajn, latvajn kaj dagestanajn fabelojn, fabelojn de Andersen kaj tiujn de fratoj Grimm.

Ni vizitis ankaŭ la belan urbon Nürnberg. Ankaŭ la vesperoj estis plenaj de arta programo – Interkona Vespero kun la fama juda bardo el Rusio Mikaelo Bronŝtejn, rusa koncerto kun Vera kaj Inga, kaj Dagestana Vespero. Ne eblas ne mencii la Zamenhofan Vesperon kaj la tradician Silvestran bufedon kaj balon. Ĉiam estas agrable ekbonvenigi la novan jaron kun geamikoj el diversaj landoj. Por honorigi ĉiujn, oni tradicie tostas multfoje laŭ la ŝanĝohoro de la koncernaj landoj: je la 22<sup>a</sup> horo Rusio, je la 23<sup>a</sup> Litovio kaj Israelo, noktomeze – meza kaj okcidenta Eŭropo kaj je la 1<sup>a</sup> horo – Britio kaj Portugalio.

Mi volas mencii ke la Israela Vespero, kiun Amri kaj mi prezentis, estis por mi tre kortuŝa. Por ebligi al niaj geamikoj “gustumi” iomete de nia lando, ni montris filmeton pri Israelo, kunkantis israelajn kantojn (Esperante kaj hebree), kundancis israelajn popoldancojn kaj eĉ kunmanĝis falafelon.

Kiel ĉiuj bonaj aranĝoj, kiuj pasas tre rapide, ankaŭ tiu ĉi semajno “flugis”. Ni adiaŭis kaj revenis hejmen, kiel ĉiam, kun miksitaj sentoj – kun bedaŭro, ĉar ĝi finiĝis, kaj kun ĝojo, sciante ke ni certe ie iam renkontiĝos. Mi rekomendas al vi partopreni IF-on. En decembro 2010 ĝi okazos en la sama bela kaj komforta loko. Vi certe ĝuos la Internacian Festivalon.

La Israela Vespero dum IF



## Agado de ELI dum 2009

*Internacia Libro-Foiro de Jerusalemo* – feb. 2009 en Binjanéj Ha'umá. ELI luis budon kaj dum tuta semajno ni eksponis E-librojn, vendis kaj prelegis. Vizitis gravuloj kiel prezidento Peres, verkistoj Amos Oz kaj David Grossman, eksparlamentanoj Sarid kaj Bejlin. Haltis ĉe la budo miloj da homoj kaj centoj da flugfolioj disdoniĝis.

La *10-a KIES* okazis en Pacoazo fine de oktobro. Partoprenis 55 personoj, el ili 11 eksterlandanoj. Ni organizis du post-KIES ekskursojn por ili. ELI decidis okazigi la venontan KIES en Kacrin, 20–22 de majo 2010.

*Ekskursoj:* Okazis du ekskursoj en Tel-Avivo (aprilo) kaj Jafo (majo). Okazis tri REVI-ekskursoj por gejunuloj (du al judea dezerto, unu al Golano).

La *tutlandaj kunvenoj* okazis en Tel-Avivo en junio kaj en decembro, partoprenis ĉ. 50 personoj.

*Loka agado:* En Tel-Avivo oni kunvenis ĉiusemajne.

Partoprenis inter 7 kaj 24 personoj. En Ĥajfa okazis ĉi-jare kelkaj kunvenoj en la hejmo de Martha Otto.

En Jerusalemo okazis 4 kunvenoj.

*Kursoj:* en T-A finiĝis la kurso kun 6 finintoj. Ne komenciĝis nova kurso, pro ne sufiĉa aliĝo. Okazas en Domo Bikuréj Ha'itím paroliga kurso preskaŭ ĉiun mardon.

*Loĝejo de Dratwer:* La apartamento de ELI en Bat-Jam (“Dratwerejo”) estis reluigita al privata familio.

*JELI:* Dum la jaro okazis kelkaj kunvenoj de niaj junuloj. Partoprenis 10–15 gejunuloj.

*Israela Esperantisto:* Aperis du numeroj, duobla jubilea n-ro 148-9 en januaro kaj n-ro 150 en decembro.

*KAEM:* En 2008 ELI aliĝis al la Azia Komisiono de UEA. Esti Saban reprezentis ELI en la kunsido de KAEM en Bjalistoko. ELI invitis la 7-an Azian Kongreson por 2012. En junio 2010 KAEM decidis kie okazos la kongreso.



Vintra Landa Kunveno de ELI

# Esperanto en la amasmedio

## Radio

– julie, Doron Modan kaj Enrica Arbib estis intervjuitaj de la radio-stacio GALEJ-CÁHAL dum 10 minutoj pri Esperanto, inkluzive kantadon.

– aŭguste, en la programo *Haša'á Habejnleumit* ('internacia horo') de la centra radistacio REŠET B/KOL ISRAEL, estis aŭdigita intervjuo kun Josi Šemer.

– okaze de la 150-a naskiĝjubileo de Zamenhof, la matenajn novaĵojn en REŠET B la 15-an de decembro komencis notico pri li kaj la Internacia Lingvo.

## Gazetaro

– oktobre, ĵus antaŭ KIES, aperis en MODI'IN NEWS (la plej granda gazeto de la regiono) du-paĝa intervjuo pri Esperanto, kun Ajala Danon kaj Amri Wandel, kun emfazo pri la denaskaj parolantoj.

– samomaĝe kun la radio, la 16-an de decembro en unu el la grandaj israelaj gazetoj JEDI'ÓT 'AĤARONÓT estis



publikigita artikolo pri Esperanto kaj rilata intervjuo kun Amri Wandel.

## Televido

En januaro Esperanto aperis dufoje: 25.01 Amri Wandel intervjuiĝis pri E-o en programo *Ĥocé Israel* (kun la konata intervjuisto Rino Cror) de KANALO 23 <http://www.23tv.co.il/282-he/Tachi.aspx>.

26.01 kadre de la socikultura programo 'La klubo' oni elsendis 11-minutan intervjuon pri la jubileo de Zamenhof kun Gian Piero Savio kaj Amri Wandel, kun komenca prezentado Esperantlingva <http://www.23tv.co.il/275-he/Tachi.aspx>.

## Persone

La 11–12-an de septembro okazis en Jerusalemo la aranĝo 'Domoj deinterne'.

Dum ĝi estis malfermita ankaŭ la 'Zamenhof-domo'

– loĝejo de iama aktivulo Ĥanoĥ Rusak – tre interesa, malnova sed bela domo. La okazo estis eluzita por informi pri la lingvo kaj ĝia kreinto, kaj miloj da personoj vizitis dum la du tagoj la E-budon situantan en la historia domo.



## Nekrologoj

### Josef Šemer

### Ĥajim Midler (1934–2010)

La 12-an de januaro 2010 forpasis en Tel-Avivo, pro kormalsano, Ĥajim Midler. Li estis 75-jara.

Li lernis Esperanton en la malfruaj 70-aj jaroj kaj ekde lia emeritiĝo en 2001 vizitadis regule la Esperanto-klubon en Tel-Avivo.

Ĥajim naskiĝis en Tel-Avivo en 1934. Li laboris dum multaj jaroj kiel

magazenisto ĉe aŭtomobil-firmaoj. Junaĝe li dum kelkaj jaroj laboris en la minejoj de Timna, apud Ejlal.

En 1963 lia edzino Lea blindiĝis pro akcidento kaj ekde tiam li devis multege helpi al ŝi. Ankaŭ ŝi kaj ilia filo lernis Esperanton, kune kun li, sed li estis la sola, kiu daŭre restis en la movado. Li estis tre simpatia homo kaj granda amanto de Esperanto, kiu regule donacis monon al ELI.

Estu lia memoro benata!

### **Naomi Armoni (1922–2009)**

---

La 2-an de oktobro 2009 forpasis en Tel-Avivo Naomi Armoni, en la aĝo 87. Ŝi naskiĝis kaj daŭre loĝis en Tel-Avivo. Esperanton ŝi lernis ĉirkaŭ 1985. Iom poste ŝi aliĝis al ELI kaj UEA kaj dum pli ol 15 jaroj partoprenis multajn esp. eventojn, inkluzive de kelkaj Universalaj Kongresoj. Interalie ŝi partoprenis tiujn okazintajn en Kubo, Ĉinujo, kaj Aŭstralio. Ŝi tre amis Esperanton kaj kun fervoro servis kiel helpantino dum la UK okazinta en Tel-Avivo en la jaro 2000.

Naomi estis infan-ĝardenistino kaj poste instruistino. Ŝi dediĉis sian tutan karier-vivon al instruado kaj edukado: ŝi instruis kaj trejnis ĝardenistinojn,

studis en la universitato diversajn fakojn kaj fine fariĝis magistro. Dum du jaroj ŝi instruis la hebrean lingvon en Kanado, sendita de nia ŝtato.

Dum multaj jaroj ŝi vizitadis preskaŭ regule nian lokan klubon sed devis ĉesigi tion antaŭ kelkaj jaroj pro daŭra malsaniĝo. Mi memoras ŝin kiel klera kaj sciama virino, amikiĝema kaj tre agrabla.

Estu ŝia memoro benata!

### **Sara Nastoviĉ (1926–2010)**

---

La 11-an de januaro 2010 forpasis en Tel-Avivo, post mallonga severa malsano, Sara Nastoviĉ. Ŝi estis 83-jara.

Sara naskiĝis en 1926 en urbeto apud Odeso (Sovetio). Dum la dua mondmilito ŝi sukcesis kaŝi sin kaj travivi la teruraĵojn. Post la milito ŝi vivis dum mallonga tempo en Rumanujo kaj en 1948 kun sia edzo elmigris Israelon. Ŝi naskis du filinojn kaj antaŭ pli ol 20 jaroj vidviĝis. Dum 10 jaroj Sara laboris kiel flegantino de maljunuloj.

Ŝi lernis Esperanton en 2002 kaj vizitis ofte la tel-avivan klubon. Ŝi ankaŭ vizitis la UK-on en Florenco (2006). Ni memoros ŝin kiel tre agrabla kaj afabla virino.

Estu benata ŝia memoro!

# Jacobus (Koos) Wieberdink

**Rob Moerbeek, Nederlando**

VENDREDON la 25-an de septembro 2009 en la plenplena aŭlo de la kremaciejo Driehuis-Westerveld ni adiaŭis neordinaran homon: Jacobus (Koos) Wieberdink. Lian vivon skizis la filo Tjeerdo, kiu poste disponigis la tekston. Ekzistas kompleta Esperanta versio, laŭpete ricevebla. Ni resumas, escepte de la frazoj dediĉitaj al Esperanto.

Koos Wieberdink naskiĝis en 1918 en Weltevrede, apud la tiama Batavia, de gepatroj, kiuj ambaŭ praktikis medicinon. Li tamen finstudis en Nederlando. Ĉi tiu kuraĝa, absolute sincera kaj plendediĉa pioniro de malferma kor- kaj angi-operaciado jam dummilite savis judajn infanojn, cedis la propran pasporton al minacato. Pro tio li ricevis la *Jad Vašem* -distingon en 2000, sed jam antaŭe nederlandan Bronzan Krucon pro vivdanĝera kuracado al soldatoj en Indonezio.

Kiam li kiel profesoro-hirurgo prioritatis la pacientojn, ne povis manki konfliktoj kun kolegoj. Li demisiis sed daŭrigis sian praktikadon en Jerusalemo, Indonezio kaj Novzelando. Tamen post nelonge oni bezonis lian kapablon en Amsterdamo kaj Roterdamo. Li verkis “Malferma kor-kirurgio” kaj “Cionismo kaj Socialismo”, kaj iniciatis la fondaĵon “Scienca Esplorado de Kristana Literaturo pri Judoj kaj Judismo” \*.

Senkompromise li defendis Israelon, kio ne faciligis diskutadon. Kunestadon kun muziko aŭ diskuto li ŝategis.

Krome li komencis lerni Esperanton. Li estis konvinkita ke la vasta diskonigo de universala lingvo, ne ligita kun ajna lando, povas grave kontribui al la paco. Li ankaŭ engaĝis sin por la katedro pri Esperanto, kiu antaŭ nelonge efektiviĝis. Li forpasis hejme, sendolore, la 17.09.2009, pli-ol-90-jara.

Ni aldonu: apud la meritoj de Hans Erasmus, Edwin Burg, Marc van Oostendorp kaj aliaj, ni do enskribu en la Panteonon de Esperanto-instruado la nomon de Koos Wieberdink.

\* Noto de la resuminto: Unu el ĝiaj publikaĵoj, “De zaak Jezus en de Joden” de prof. Thomsen, aperis ankaŭ en Esperanto.